



UvA-DARE (Digital Academic Repository)

La Zamenhofa Heredaĵo en la Muzeo pri la Judoj en Pollando

Gobbo, F.

Publication date

2018

Document Version

Final published version

Published in

Fenikso

License

Article 25fa Dutch Copyright Act

[Link to publication](#)

Citation for published version (APA):

Gobbo, F. (2018). La Zamenhofa Heredaĵo en la Muzeo pri la Judoj en Pollando. *Fenikso*, 23(2), 7. https://www.esperanto-nederland.nl/esp/fenikso/2018/Fenikso_mrt_apr_2018.pdf

General rights

It is not permitted to download or to forward/distribute the text or part of it without the consent of the author(s) and/or copyright holder(s), other than for strictly personal, individual use, unless the work is under an open content license (like Creative Commons).

Disclaimer/Complaints regulations

If you believe that digital publication of certain material infringes any of your rights or (privacy) interests, please let the Library know, stating your reasons. In case of a legitimate complaint, the Library will make the material inaccessible and/or remove it from the website. Please Ask the Library: <https://uba.uva.nl/en/contact>, or a letter to: Library of the University of Amsterdam, Secretariat, Singel 425, 1012 WP Amsterdam, The Netherlands. You will be contacted as soon as possible.

De la katedro

La Zamenhofa Heredaĵo en la Muzeo pri la Judoj en Pollando

En la tagoj 13-15 decembro 2017 en Varsovio okazis esplorateliero pri la Zamenhofa heredaĵo inter judismo kaj Esperanto en la Muzeo POLIN, kies celo estas gardi la memoron de la judoj kiuj vivis sur la pola sojlo. La konstanta ekspozicio de la mil jaroj de juda historio en tiuj teritorioj – kiu ja okupas 1000 kvadratajn metrojn da spaco – konstruiĝis sur la originalaj ŝtonoj de la strato kiu hodiaŭ portas la nomon de la fondinto de Esperanto, Zamenhof, en la centro de la juda kvartalo, ne malproksime de la juda tombejo kie troviĝas interalie multaj membroj de la familio Zamenhof.

La dato elektita por la ateliero tute ne estis hazarda: la ĉefa organizanto, Federico Gobbo, de la Universitatoj de Amsterdamo kaj Torino, volis festi la heredaĵon de Zamenhof la Zamenhofan Tagon de la Zamenhofa Jaro, tio estas la 15an de decembro 2017. Kune kun la koleginino Liliana Ruth Feierstein, de la Universitato Humboldt en Berlino kaj de la Centro de Judaj Studoj en Berlino kaj Brandenburgio, la du fakuloj zorgis inviti esploristojn konatajn je monda nivelo pri esperantologio kaj judaj studoj, kaj aparte pri *Yiddishkeit*, tio estas Jideco.

La figuron de Zamenhof oni analizis ekde diversaj perspektivoj pri multaj aspektoj rilataj al lia duobla projekto lingva kaj religia-filozofa, alivorte Esperanto – inkluzive de la variaj pra-Esperantoj – Hilelismo (la religia parto) kaj Homaranismo (la filozofia parto).

Paralele al la esplorateliero, kiu estis organizita laŭ invito do sen ekstera publiko, Federico Gobbo pretigis publikan lecionon en la angla kie li legis diversajn originalajn poemojn en Esperanto kaj eltirojn el la Zamenhofa verkaro, kun oportunaj komentoj, montrante kiom aktuala ja estas la homaranisma filozofio nuntempe.

Ĉiuj informojn menciitaj supre estas je dispono en la sekva retpaĝo (en la angla):

<http://www.polin.pl/en/event/is-it-possible-for-all-people-to-speak-the-same-language>

Federico Gobbo (Amsterdamo / Torino)



tahelaĵo Muzeo POLIN

Ĉeesto Esperanto Nederland ĉe eventoj okaze de la Zamenhof-jaro

La 11an de decembro 2017 en sidejo de UNESKO en Parizo okazis memorkonferenco por la centa datreveno de la forpaso de L.L. Zamenhof. Andries Hovinga ĉeestis nome de Esperanto Nederland. Okazis diversaj prelegoj. Temoj: tutmondiĝo, interreto, Unesko-Kuriero kaj "kiel statas Esperanto, cent jarojn post la morto de Zamenhof?"

Resumoj vi povas legi en tiu-ĉi paĝo: <https://esperanto-france.org/jaro-Zamenhof>.